

Zamenhofa festo

Claude Gacond, 115-a radioprelego, 1965.12.15 & 1965.12.18

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas Svisa Kurtonda Radiostacio. Prelegas Claude Gacond.

En la esperanta mondo hodiaŭ la pensoj iras al Zamenhof. En tiu zamenhofa tago aŭ festo la esperantistoj ne nur honoras la iniciatinton de sia lingvo, sed ĉefe la pensulon. Tion farante ili pravas.

Miaj funkcioj kondukas min analizi la kaŭzojn de la sukceso de esperanto rilate al la stagnado de la aliaj projektoj de lingvoj internaciaj. Mi alvenis iom post iom al la konvinko, ke la progresoj de nia lingvo estis en la komenco ĉefe ŝuldataj al la personeco mem de Zamenhof. La saman fenomenon ni rimarkas en plej diversaj sociaj procezoj. Ni citu kelkajn, kiuj havas similecon kun nia movado.

Pasintan jaron mi prezentis al vi la influon de Henri Dunant. La kreo de monda sanitara organizaĵo estis dum la pasinta jarcento historia bezono. Sen Henri Dunant tia organizaĵo estus ankaŭ naskiĝinta. La rolo de Henri Dunant estis tamen grandega : li inspiris al ĝi penson, sintenon, kiuj hodiaŭ ankoraŭ estas senteblaj. Li personigis la ideon.

Dum oni festas la dudekan jaron de Unuiĝintaj Nacioj, oni ne povas silenti pri la rolo de inspiranto, kiel prezidanto Wilson, unu el la instigantoj de Ligo de Nacioj kaj poste pri tiu de sinjoro H, kiu spite reziston kaj mankon de statuta bazo, trovis la forton tamen agi kaj pensi.

Nia jarcento vidas la popolojn liberiĝi el la koloniaj kaj ekonomiaj subpremadoj. Inter la herooj por tiuj liberiĝoj gigantas Mahatma Gandhi, ĉar li ne nur enkorpigis la dezirojn de sia generacio kaj nacio, sed personigis kaj formuligis revoluciigan kaj universalan luktometodon hodiaŭ nomata satjagraho.

Unu el liaj disĉiploj hodiaŭ gvidas la emancipadon de la nigr-haŭtuloj en Usono. Tiu pastoro Martin Luther King blovas en vastegan movadon vivoforton similan al tiu, kiun nia Majstro kapablis blovi en nian movadon.

Tiuj gvidantoj posedas komunajn trajtojn. Ilia penso ofte ne estas tre preciza (kaj tion dialektikistoj ofte riproĉis al ili), penso konstante evoluanta (fine ĉu ne estas granda kvalito !). Kio ilin ankaŭ stampas, tio estas ilia volo servi noblan kaŭzon per noblaj rimedoj, anstataŭ uzi flatemon al la popolaj instinktoj. Ili servas la veron kaj abomenas ĉiajn ŝovinismojn. Ili elektis tiun direkton ofte post partopreno en ŝovinismo. Zamenhof antaŭ ol fariĝi homarano estis sionisto, Henri Dufour antaŭ ol krei la Ruĝan Krucon varbadis prozelitojn al sia religio kaj Wilson prezidis unu el la plej grandaj nacioj, nacio kiu rifuzis eniri la de li fonditaĵon.

Ili rezistis al granda tento. En ilia vivo eĥas la sinteno de Kristo, kiu, en la dezerto, kiam la diablo lin portis spirite al monto tre alta, kaj montris al li ĉiujn regnojn de la mondo kaj ilian gloron, respondis ne kaj rifuzis kliniĝi antaŭ la diablo.

Tiu tento ekzistas por ĉiu homo. Gvidantoj povas ja gvidi nur ĉar ekzistas gvidatoj. Mi ne citos nomojn, sed vi facile povas trovi naciajn, politikistajn, religiajn aŭ movadajn gvidantojn, kiuj kliniĝis antaŭ la diablo. Ili dorlotis la flatemajn kaj malaltajn instinktojn de siaj sekvantoj. Pro tio ili fariĝas momente ofte terure potencaj.

Se ni ne ĉiuj povas esti gvidantoj, ni ĉiuj estas la gvidatoj de gvidantoj. La diabla tento direktas sin ankaŭ al ni. Nia sinteno kaj laboro montras, kian majstron ni akceptas servi.

La historio de nia movado donas ekzemplojn de ambaŭ sintenoj antaŭ tiu tento. Zamenhof klare montris al ni irindan vojon. Unu el liaj ĉefaj diroj tiurilate troviĝas en **Esenco kaj Estonteco**, lia ĉef-verko. Mi citas : « *Ni batalas ne pro la formo, sed pri la ideo, la formon konkretan al nia batalado ni donis nur tial, ke ĉia batalado abstrakta kaj teoria ordinare al nenio kondukas.* »

Zamenhofa festo

Claude Gacond, 115-a radioprelego, 1965.12.15 & 1965.12.18

Mi ne aŭdis oftan citadon de tiu zamenhofa diro, sed mi konstatis, ke kiam la esperantistoj rigardas al la formoj anstataŭ kulturi sian ideon, tiam ili disputas kaj eĉ rezignas pri sia homarana alvokiĝo. Servante la formojn ili provas trankviligi sian spiriton, kiu estas alvokita de Zamenhof al supergrupa, supernacia, tutmonda, tuthomara, universala agado. Kiam ili troviĝas antaŭ elekto por la nacio aŭ por la homaro, tiam ili troviĝas antaŭ la diabla tento. Ĉu ili ĉiam pruvis sian mondanecon ?

Se Zamenhof estus doninta al ni nuran lingvon, jam de longe tiu lingvo estus malaperinta pro la lingvaj disputoj. Ĝi verŝajne ne estus venkinta la reformajn krizojn en la fino de la pasinta jarcento. Zamenhof alportis al ni ismon, kiu estas al nia lingvo kvazaŭ spirito al korpo.

Dum nacioj vidas en sia gento la superan leĝon, dum religianoj vidas en sia eklezio la solan savilon, dum politikistoj vidas en sia partio la solan aŭtoritaton, la esperantistoj, pro la semado zamenhofa, ne plu povas partopreni tiujn ŝovinismojn sen senti mallarĝigon de sia personeco, malobeon al sia universala alvokiĝo. Zamenhof, per sia lingvo, semis en niaj cerboj ĝermojn al tuthomeco.

Ni diras ĝermojn, ĉar ĝuste formemuloj riproĉas al la aŭtoro de nia lingvo la nebulecon de lia ideologio. Zamenhof ne povis diri pli, ol li skribis. Li ne volis kaj verŝajne ne povis krei dialektikon. Li nur volis montri direkton. Li aliigis nin de la neesperantistoj. Li vekis la mondlingvanojn al supernacia popoleco. Ĉu jam ne estas multo ?

Rezulto : la esperanta movado estas unu el la solaj movadoj, kiuj ne kliniĝis antaŭ la ideologioj, kiuj sin dividas la mondon. Super ĉiuj limoj kaj baroj ĝi konstante laboras al la konstruo de vera homaro.

Ni fariĝu esperantistoj, kiuj ne nur admiras sian Majstron (tio ja fariĝas eksmoda), sed kiuj legas kaj meditas lian verkaron.

Ni tiam malkovros pripensigajn verojn.

« *Anstataŭ blinde ripeti frazojn, vi bezonas nur simple **ekpensi*** », diras Zamenhof al ni en la verko *Esenco kaj Estonteco*.

Vi aŭdis Radio-Svislandon per la voĉo de Claude Gacond, kiu diras al vi :

Ĝis reaŭdo !

-oOo-